

# Popolo popolon atakas kruele…

**Homaron Vi kreis perfekte kaj bele**
**Sed ĝi sin dividis batale;**
**Popolo popolon atakas kruele,**
**Frat' fraton atakas ŝakale.**

Kiam L.L. Zamenhof, akompanita de lia edzino, estis survoje al Parizo por ĉeesti la 10an Universalan Kongreson de Esperanto, ĉar lia loĝlando, Polujo, apartenis tiam al la imperio de la rusa Caro, kiu ekestis milite kontraŭ Germanio, li ne povis trairi ĉi tiun landon destine al Francio, kiu, ankaŭ ĝi staris en milito kontraŭ Germanio. Cetere, la kongreso mem estis suspendita. Al ĝi estis aliĝintaj 3739 personoj, pli ol en ĉiuj antaŭaj U.E. kongresoj.

Reveninte al Varsovio, li okupiĝis precipe pri tradukado, de Andersen-fabeloj kaj partoj de la Biblio. Pro malsano li devis ĉesi sian profesian kuracadon kiel okulisto. De tiam kaj ĝis la tago de lia morto, kiu okazis la 14an de aprilo de 1917, li tre suferis, korpe, pro malforteco de la koro, manko de pulso kaj malfacilaĵoj por enspiri, kaj anime pro la granda tragedio kaj la hororoj de la milito kiu dum tiuj jaroj dronigis Eŭropon per sango.




**Ejo de la 10a Universala Kongreso de Esperanto, kiu ne okazis.**

Tiu milito reprezentis la fiaskon de la strebado de lia tuta vivo, de lia revo kaj lia plano. La Granda Milito okazis pro tio ke venkis la naciismoj, la ŝovinismo, la imperiismoj, la malamo inter la homoj. Kontraŭ ĉio ĉi li estis batalinta senĉese. La strofo de "La Preĝo" de Zamenhof, kiun ni metis komence de ĉi tiu ĉapitro, montras la manieron kiel li vidis la antaŭan historion de la homaro. Ĝuste al tiu historio li volis meti finon per sia lingva projekto, aŭ pli ĝuste, per sia projekto, ne nur lingva sed ankaŭ homarana laŭ lia esprimo.

Por li la "homaranismo", ja, estis la kerna aŭ interna ideo de la internacia lingvo. Lia ideo estis ke la nacioj malaperu kaj ke ĉiuj homoj havu unu komunan lingvon kaj komunan bazan kredon pri "plej alta estaĵo". Tio signifus nek la malapero de aliaj lingvoj nek de aliaj religioj. Laŭ la postuloj de homaranismo, ĉiu lando havu neŭtralan geografian (ne gentan) nomon, kaj apartenu al ĉiuj enloĝantoj samrajte. Ĉiu havu la rajton uzi private iun lingvon preferatan, sed kun aliaj homoj kaj kun institucioj oni parolu home-neŭtralan lingvon. Religie, homoj restu ĉe sia religio laŭdezire, sed tiuj apartaj religiaj dogmoj ne rajtas kontraŭdiri al scienco. Eĉ inter esperantistoj homaranismo restis nesukcesa, kaj nuntempe nur tre malmultaj nomas sin homaranismanoj.

Li faris alvokon al diplomatoj enhavante tiun homaranisman programon, kiun oni devus pridiskuti en internacia kongreso, sed ĝi havis neniun sukceson kaj tia kongreso neniam okazis.

Sed dum la milito, konkrete en la jaro 1915 okazis iu 11a U.K. de Esperanto en San Francisco, Usono, sed nek Zamenhof nek multaj aliaj geesperantistoj el diversaj landoj povis partopreni. Fakte, estis nur 163 ĉeestantoj.